6. La **kotizojn bv. ĝiri al: Esperanto-Gesellschaft Südharz**, kontonumero: 101457927 BLZ: 26351015, Sparkasse Herzberg, internacie: IBAN: DE28 2635 1015 0101 4579 27 SWIFT/BIC-kodo: NOLADE21HZB
aŭ **eblas uzi la UEA-konton de nia Interkultura Centro Herzberg:** ikch-a, Tiukaze nepre sendu al ni kopion pri via kompleta ĝirado. (La pagmanieroj de UEA troviĝas en la jarlibro 2007 sur la paĝoj 36 kaj 37.)

7. Bv. sendi vian aliĝilon al:
Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg – la Esperanto-urbo, Germanio.
Telefono: 0049-(0)5521-5983 aŭ rete: esperanto-zentrum@web.de

Partoprenkotizo:

Prezoj (€):	ĝis 15.01.	ĝis 31.03.	poste
B-landoj	135	160	195
A-landoj	170	195	230

Aliĝilo

Mi aliĝas en kategorio …….. kaj pagas …… € partoprenkotizon

Familia nomo: ..... Persona(j) nomo(j): .....

UEA-kodo: ..... Telefono/fakso: .....

Poŝta adreso: .....

Retadreso:.....

1. Mi petas tranoktadon de la ……a ĝis la ……..a de julio en (prezoj po nokto, po persono):
❒ privata apartamento por ĉ. 20-25 € (se min. 2 personoj)
Mi dividos la apartamenton kun: .....
2. Mi petas tranoktadon en hotelo kun matenmanĝo:
❒ 1-lita ĉambro por ĉ. 40 €
❒ 2-lita ĉambro por ĉ. 30-35 €
Mi dividos la hotelĉambron kun: .....
3. Mi petas tranoktadon en kvarstela hotelo kun matenmanĝo:
❒ 1-lita ĉambro por ĉ. 50 €
❒ 2-lita ĉambro por ĉ. 40-45 €
Mi dividos la hotelĉambron kun: .....,.

Mi venos per trajno / aŭto.
❒ Mi estas vegetarano.

Rimarkoj:.....

Mi ĝiras entute .....€ je la (dato): .....al:.....

Dato: ..... subskribo:.....

KULTURTURISMA SEMAJNO

antaŭ la UK 2008
inter 11-19 julio 2008

Herzberg am Harz
... die Esperanto-Stadt
... la Esperanto-urbo

La Esperanto-urbo estas 2-jara! Festu kun ni: la 11-an de julio 2006 la urba konsilantaro de urbo Herzberg am Harz unuanime voĉdonis por la oficiala kromnomo (titolo) Herzberg – la Esperanto-urbo. Tio estas unika fenomeno en la mondo en la pli ol 120-jara historio de Esperanto. Do vi alvenos

okaze de la dua naskiĝtagfesto de Herzberg – la Esperanto-urbo.

Inter alie atendos vin:
– dulingvaj vojmontriloj, ŝildoj, bonvenigtabuloj
– E-lingvaj turismaj broŝuroj, bildkartoj pri la plej gravaj vidindaĵoj
– esperantlingvaj manĝokartoj kaj eĉ specialaj Esperanto-manĝaĵoj
– Esperanto-intruado en la baza lernejo kaj en la gimnazio
– riĉa Esperanto-biblioteko en Interkultura Centro Herzberg
Ĝoju pri tiu modelurbo por Esperanto meze en Eŭropo, en la alloga, pitoreska turisma regiono de la Harz-montaro.

Venu, vidu kaj spertu mem!

Kiel atingi Herzberg am Harz?

La plej proksima flughaveno estas en Hannover (Hanovro): prenu lokan trajnon al la ĉefa stacidomo (Hauptbahnhof), de tie veturu per trajno tra Göttingen ĝis Northeim. En Northeim ŝanĝu al direkto Nordhausen ĝis Herzberg (do ĉ. 25 min.). Per trajno de ĉiuj germanaj flughavenoj: Berlin, Dortmund, Halle, Leipzig, Köln, Paderborn, ktp. estas nur kelkhora trajnveturado.

Frankfurt/Main: prenu rapidtrajnon (ICE) ĝis Göttingen (ĉ. 1 horo) kaj de Göttingen veturu rekte per trajno tra Northeim al Herzberg am Harz (ĉ. 40 min).
Laŭ peto ni helpos trovi taŭgan vetur-itineron.

Aŭtomobilistoj trovas informojn sur nia hejmpaĝo aŭ sur la hejmpaĝo de nia urbo Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo.

www.esperanto-urbo.de

Programo:

11.07.2008 vendredo — Tago 0.

Alventago (por frualvenantoj):
de la **16a horo: akcepto** en restoracio Artemis (Welfenhof), proksime al la ĉefa stacidomo
20:00 vespermanĝo: laŭ individua mendo, salutvespero

12.07. sabato — Tago 1.

vizito/akcepto en Interkultura Centro Herzberg (ICH)
Antaŭtagmeze: rondrigardo en Herzberg (E-rondvojo), butikumado
Tagmanĝo: individue en bufedoj (kun esperantlingvaj manĝokartoj)
Posttagmeze: urborigardado en Herzberg, Kastelo, kastela muzeo
Vespere: 19:00 komuna vespermanĝo en la greka restoracio Artemis (Welfenhof),
Festvespero (kune kun INA) okaze de la 2-a naskiĝtagfesto de la Esperanto-urbo

13.07. dimanĉo — Tago 2.

Tuttaga ekskurso: Hameln. Historia urbo kun multaj mezepokaj faktrabdomoj, loko de la fama legendo „La Ratkaptisto". Ebleco kontakti la regionan Esperanto-grupon „Ratkaptistoj".

14.07. lundo — Tago 3.

Antaŭtagmeze: vizito en la urbodomo de Herzberg, akcepto ĉe la urbestro de la Esperanto-urbo, **ekskurso (komune per aŭtoj) al Rhume-fonto**, mezepoka urbo Duderstadt kun malnovega urbodomo, ktp.
Posttagmeze: libera programo, vidindaĵoj en Herzberg laŭ itinero Akvo-8: (instrupado kun informtabuloj kaj resumaj frazoj en Esperanto) laŭ kanaletoj, riveroj, apud la akvofalo, ebleco naĝi en la granda urbocentra lago (28 m-ojn profunda en la mezo).
Vespere: prelegoj, prezentado pri historio kaj turismaj allogaĵoj de la Harz-montaro, Nacia Parko Harz.
Komuna vespermanĝo kun reprezentantoj de la Esperanto-urbo, vespera literatura programo kun aŭkcio de Esperantaĵoj (favore al ICH).

15.07. mardo — Tago 4.

Ekskurso 1. E-lingva gvidado dum migrado en la tuj apuda Nacia Parko Harz, promeno en la fabeleca vilaĝo Lonau, vizito de rarajo: bredejo de urogaloj.
Ekskurso 2. E-lingva gvidado, promeno en inter-montara vilaĝo Sieber, arbara ekskurso al panorama turo sur la monto Grosser Knollen (687 m).
Ekskurso 3. Per etŝpura nostalgia trajno tra la belega orienta Harz-montaro (ĉ. 30–40 € kromkostoj).
Por atingi la plej altan pinton Brocken (1142 m) kun impona panoramo al la tuta Harz-regiono kostas pli.

Vespere: komuna vespermanĝo, E-kulturvespero kun muziko, babilado, lingvaj ludoj, E-filmoj.

16.07. merkredo — Tago 5.

Antaŭtagmeze: trajnekskurso al Osterode am Harz, urbo de la regiona administracio, (promenado en la historia urbocentro, mezepoka urbodomo, vendoplaca preĝejo, ruinoj)
Posttagmeze naĝado en la urba plezurnaĝejo (saŭno, ŝpruc-basenoj kaj subĉielaj kaj subtegmentaj)
Vespere 20:00: internacia orgenkoncerto en Nicolai-preĝejo (aparte pagenda)

17.07. ĵaŭdo, — Tago 6.

Antaŭtagmeze: libera programo, et-grupaj **vizitoj al Germana Esperanto-Centro/ Interkultura Centro Herzberg kaj al la urba Esperanto-arkivejo en la malnova urbodomo** (prezentado de la kolektaĵoj: libro-rarajoj, sonmaterialoj, turismaj prospektoj, filatelaĵoj, gazetoj el la tuta mondo, memoraĵoj de Joachim Giessner)
Posttagmeze: busekskurso tra la okcidenta parto de la Harz-montaro (universitata urbo Clausthal-Zellerfeld, mineja muzeo, lagoj, akvobaraĵoj, **mondheredaĵ-urbo Goslar** kun unika mezepoka arkitekturo, historia kastelo Kaiserpfalz).
Kaf-trinkado kun loka kuko-specialaĵo Windbeutel.

18.07. vendredo — Tago 7.

Trajnekskurso al la bela grandurbo Braunschweig (kie GEA estis fondita en 1906), la fama urbo de Grandduko Henriko la Leono. Vizito al muzeoj, katedralo, malnova urbodomo en la historia urbocentro kun detala gvidado en Esperanto, renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.
Vespere: komuna vespermanĝo kun bunta adiaŭa vespero, muziko, dancado, lotumado de Esperantaĵoj.

19.07. sabato — Tago 8.

Komuna veturo al Roterdamo, al la 93a UK.

Partoprenkondiĉoj:

1. En la prezo estas inkluzivitaj: ĉiuj trajnbiletoj (krom la fakultativa ekskurso per la etŝpura trajno), busekskurso kun kukospecialaĵo, enirbiletoj al muzeoj, 4 komunaj vesper-manĝoj, urborigardadoj kun ĉiĉeronado en Esperanto, prelegoj kaj prezentadoj, kulturaj programoj (krom la orgenkoncerto).

2. Loĝado:. La sekvaj tranoktebloj estas rekomendataj:
– privata apartamento (por min. 2 personoj),
– hotelĉambro kun matenmanĝo, 4-stela hotelo (kun matenmanĝo).
En Herzberg ne estas junulargastejo. Tendumi eblas en antaŭurbetoj (3-5 km-ojn for).

3. Post la aliĝo kaj alveno de via pago vi baldaŭ ricevos Konfirmilon.

4. Malmendoj devos esti skribaj. Por malmendoj faritaj antaŭ 01.06.2008 oni retenos 50 €, poste 90 €. Post 30-a de junio 2008 repagoj ne plu eblos.

5. Pli da informoj pri Herzberg am Harz kaj pri Interkultura Centro Herzberg vi trovas sur la hejmpaĝo de nia urbo: http://www.herzberg.de aŭ ĉe: http://.ic-herzberg.de. Ni volonte sendas ankaŭ per poŝto Esperantlingvan turisman broŝuron pri la Esperanto-urbo.